

Miloš Lukáš 1897-1976

Antaŭ kelkaj monatoj pasis 120 jaroj post naskiĝo de Miloš Lukáš, kiu apartenas al plej grandaj stilistoj de Esperanto ne nur nialande, sed tutmonde. Li komprenis pli ol tridek lingvojn kaj en multaj li sciis aktive paroli kaj verki. Ekzemple li estas tre respektata en Estonio kiel propagandanto de la estona literaturo. Kaj kvankam li ne havis problemojn interkompreniĝi kun fremdlandanoj, li estis fervora esperantisto.

Miloš Lukáš naskiĝis la 15-an de septembro 1897 en Jilemnice kaj mortis la 26-an de aprilo 1976 en Hradec Králové.

Jam kiel gimnaziano li havis grandan talenton kaj intereson pri lingvoj. En la kvina klaso li vidis tradukon de Kalevala, finna eposo, en traduko de Josef Holeček, kaj li eksopiris lerni la finnan. Sed ĉar li trovis nur lernolibron por svedoj, li eklernis ankaŭ la svedan pere de la germana lingvo. Post la unua mondmilito li korespondis kun la fama estona esperantisto Hilda Dresen kaj kun ŝia helpo li eklernis la estonan. Sed liaj tradukoj el la estona aperis nur post la dua mondmilito en ĉeĥa gazetar. En 1966 estis eldonita ĉeĥlingva *Vortaro de verkistoj de sovetiaj nacioj*, por kiu li prilaboris artikolojn pri la estonaj kaj karelaĵaj verkistoj (la karela estas parenca al la finna). Sume pri 58 verkistoj. Aprezata estas lia enĉeĥigo de la estona eposo Kalevipoeg.

Pri la finna kaj estona lingvoj li interesiĝis jam dum sia studado en la Karola Universitato. Sed lia ĉefa lingvo tiam estis la greka kaj kiel gimnazia profesoro li instruis ĝin en Trnava kaj Hradec Králové. En Hradec estis inter liaj lernantoj ankaŭ la verkisto Viktor Fischl kaj nia iama kluba sekretario kaj prezidanto Zdeněk Hršel. Tial Zdeněk Hršel konsideris sia morala devo kolekti ĉiujn verkojn de Miloš Lukáš, kiujn li serĉis kun mia helpo dum 15 jaroj.



Konserviĝis foto el la jaro 1919 de la klubo en Hradec Králové. Inter la membroj ni vidas 22-jaran soldaton Miloš Lukáš kaj ĉe liaj piedoj kuŝantan Karel Hršel (muzikiston kaj patron de nia Zdeněk Hršel), kiu tenas tabulon kun stelo kaj jarindiko 1919.

En 1921 okazis en Prago Universala Kongreso de Esperanto, por kiu Miloš Lukáš (23-jara) tradukis komedion de Jaroslav Vrchlický *Noc na Karlštejně* sub titolo *Nokto en Karlův Týn*. La teatraĵo estis ludata en la teatro de Vinohrady.

Sed plej multe li tradukis poezion. Liaj plej ŝatataj poetoj estis Machar, Neruda kaj Vrchlický, tamen li tradukis po unu du poemoj ankaŭ de multaj aliaj poetoj. Plie li enĉeĥigis poemojn de Ludoviko Zamenhof. El la greka literaturo li kelkajn modernajn aŭtorojn samtempe esperantigis kaj enĉeĥigis kaj liaj tradukoj aperis paralele (spegule) en la gazeto Esperantista post la dua mondmilito. Inter liaj tradukoj ni trovas ankaŭ prozon, ekz. rakontojn de Hašek, Poláček, Drda, fragmentojn el Jirotko kaj Jirásek.

Dum la konstruado de socialismo li esperantigis kelkajn politikajn tekstojn, precipe du broŝurojn pri Ĉeĥoslovakio, *Juĝu mem!* kaj *Tridej Jaroj*.

Inter la militoj Miloš Lukáš instruis en la gimnazio de Trnava, nur post la dua mondmilito li revenis al Hradec Králové. Kiam estis renovigita la organizita movado en Ĉeĥoslovakio, t.e. fondita

Ĉeĥa Esperanto-Asocio, inter la unuaj honoraj membroj estis elektita ankaŭ Miloš Lukáš.

Ĝis nun estas tre ofte deklamataj liaj plej famaj tradukoj, nome *Romanco pri Karolo la Kvara* de Jan Neruda, *La violono de l' cigano* de Jaroslav Vrchlický, *Tomĉjo kaj driado* de František Ladislav Čelakovský, *La Cindra merkredo* de Josef Václav Sládek kaj *Profeton ne ŝtonbatu* de Vítězslav Hálek. En Ĉeĥoslovaka Antologio elstaras lia traduko de la mezepoka satiro *Stalisto kaj Studento*.

Miloš Lukáš ne zorgis pri siaj tradukoj, kiuj aperadis dise tra gazetaro, enlanda kaj eksterlanda, tial estas tre verŝajne, ke ni ankoraŭ multajn ne malkoviris. En 2016 nia klubo eldonis en malgranda kvanto la bibliografion kolektitan de Zdeněk Hršel, kiun ni plejparte donacis al gravaj bibliotekoj. Sed jam nun ni trovis en la ĉeĥa Vikipedio, ke iu el liaj ĉeĥaj neesperantistaj admirantoj tie listigis liajn tradukojn el la estona en la ĉeĥan kaj informas pri la jam menciita *Slovník spisovatelů národů SSSR*, kie 58 medialionoj estas verkitaj de Miloš Lukáš. Interesa estas ankaŭ rimarko, ke en la sekvaj eldonoj de la libro la kontribuoj de Lukáš estis ellasitaj.

El postaj tempoj ni konas ankoraŭ kelkajn liajn portretojn:



Miloš Lukáš kvindekjara



Lukáš sur mort-anonco



Kun amikoj atendante trajnon



La plej gravaj tradukoj de Miloš Lukáš

Poemoj

BAVOROVSKÝ, Gustav = Augustin Pitlík (1883-1960):

Al la maskitino "Kiu?".

Serĉo de inspiro.

BIEBL, Konstantin (1891-1951):

For la timon!

ČECH, Svatopluk (1846-1908):

La malliberulo en Bezděz.

Lulkanto de sklavino.

ČELAKOVSKÝ, František Ladislav (1799-1852):

Tomĉjo kaj la driado.

ERBEN, Karel Jaromír (1811-1870):

Ĉemizoj por edziĝa festo.

La saliko.

FA PRESTO = Karel Mašek (1867-1922)

Prologo de Kaspareto.

HÁLEK, Vítězslav (1835-1874):

Profeton ne ŝtonbatu

HAVLÍČEK BOROVSÝ, Karel (1821-1856):

Epigramoj.

Tombo.

HRUBÍN, František (1910-1971):

En novjara nokto.

KLÁŠTERSKÝ, Antonín (1866-1938):

Botelo.

KRÁSNOHORSKÁ, Eliška = Alžběta Pechová (1847-1926):

Lulkanto el la opero „La Kiso“.

KUBELKA, Josef (1868-1894):

Herbeja kvinfolio.

LEŠEHRAD, Emanuel = Josef Maria Emanuel Lešetický z Lešehradu (1877-1955):

Adaĝo.

La beninda deklivo.

Tergloba akso.

MACHAR, Josef Svatopluk (1864-1942):

Artemis.

Du enterigoj.

Funebra vestaĵo.

Giotto.

Hannibal ante portas.

[Helenaj amversoj.]

Helianto.

Ibiso.

Karikaturo pri mi mem.

Klasika belulino.

La hundo.

La lasta venko de Sofoklo.

Letereto.

[Polemono].

Post la morto.

Profetaĵo.

Romanco el la tempo de l' tridekjara milito.

Romanco pri kavalira triopo kaj ties benketo.

Romanco pri mia amiko.

Skeptikulo.

Sur Golgoto.

Tri ringoj.

NERUDA, Jan (1834-1891):

Al la patrineto.

Atentigo.
Biografioj de sanktuloj.
Demokrata poeto.
Evangelia modesteco de verkisto.
Grandanimeco.
Helgolanda romano.
Konsento.
Konsolo.
Malliberejo.
Montara balado.
Nelogikeco.
Nia horloĝo.
Prapatro de la humoristoj.
Preĝo.
Promeso.
Pseŭdonimo.
Romano pri Karolo la Kvara.
NEUMANN, Stanislav Kostka (1875-1947):
Nia kanto.
NEZVAL, Vítězslav (1900-1958):
Maljuna reĝo vivis iam.
PICEK, Václav Jaromír (1812-1869):
Lando inda je admir'.'
PITLÍK, Augustin (1883-1960), pseŭd. Gustav Bavorovský:
Ĉu amikeco aŭ amo.
Sopiras mi, sopiras...
Sur la lago de Mácha.
Vespere sub la fenestroj.
SLÁDEK, Josef Václav (1845-1912):
La Cindra merkredo.
SOVA, Antonín (1864-1928):
La regiono de Tábor.
Pastoralo.
SVOBODA, Jiří Václav (1924-1981):
Aviadisto.
ŠIMÁČEK, Matěj Anastazia (1860-1913):
Mia hundo.
ŠOLC, Václav (1838-1871):
Kanto pri la kala mano.
TYL, Josef Kajetán (1808-1856):
Ho, mia hejm'?'
Ho, kie hejm'?'
VALENTA, Edvard (1901-1978):
La blanka pordo.
VOLESKÁ, Marta (1905-1985):
La pigmeido Etulo inter bestetoj.
VRCHLICKÝ, Jaroslav = Emil Frída (1853-1912):
Akvofloroj.
Arbara motivo.
Burchiello.
Dancistinoj.
Dante Gabriel Rossetti.
El la vojaĝo.
Eloa.
Fragoj.
Harut kaj Marut.
Jasmeno.
Kvieto.
La violono de l' cigano.
La vivo.
Legendo pri sankta Zita.
Vojo inter avelujoj.
WOLKER, Jiří (1900-1924):

La leterkesto.
ZÁVADA, Vilém (1905-1982):
Ĉeĥa pacokanto.
ZEYER, Julius (1841-1901):
Helena.

Teatraĵoj

VRCHLICKÝ, Jaroslav = FRÍDA, Emil (1853-1912):
Nokto en Karlův Týn.

Prozo

AŠKENAZY, Ludvík (1921-1986):
Krak.

ČAPEK, Karel (1890-1938):
Blua krizantemo.
Kolekto de poŝtmarkoj.
La kudrilo.
Ordinara murdo.
Ŝtelita kakto.

DRDA, Jan (1915-1970):
Abelbredanto.
Embuskulo.
[Kiam releviĝos la mortintoj.]
Kirasrompilo.
La Supera Principo.
[La tria fronto.]
[Malamo.]
Ni ricevis plantidon.
[Sennoma falinto.]

HAMZA, František (1868-1930):
Azena benko.

HAŠEK, Jaroslav (1883-1923):
Kiel mi alkudris butonon al mia pantalono.
Rakonto pri cimoj.

HAUSSMANN, Jiří (1898-1923):
Fablo pri la leĝo de sovaĝejo.

HAVLASA, Jan = KLECANDA, Jan (1883-1964):
El miaj reĝaj interrilatoj.
Infanoj de maltrankvilo.
Morala instruo.

[Pentristo de kamelioj.]
HERBEN, Jan (1857-1936):
Sub la pomarbo.

HERRMANN, Ignát (1854-1935):
La malnova jako kaj la nova.

JIRÁSEK, Alois (1851-1930):
Mallumo. 29a ĉapitro.

JIROTKA, Zdeněk (1911-):
Saturnin. Parto de la 19a ĉapitro.

KAINAR, Josef (1917-1971):
Kiel oni verkas kristnaskan rakonton.

LEŠEHRAD, Emanuel = (z) LEŠEHRAD(u), Josef Maria Emanuel Lešetický (1877-1955):
Portreto de edzino.

MAREK, Jiří = PUCHWEIN, Josef Jiří (1914-1994):
Letero al miaj filoj.

MUŽÍK, Augustin Eugen (1859-1925):
Kontrastoj.

NERUDA, Jan (1834-1891):
Kien ĝin meti?
Miaj samkvartalanoj.

PODHORNÁ, Věra = HOFMANOVÁ Věra (1917-1994):
La ŝapveziko.
POLÁČEK, Karel (1892-1944):
El la vivo de ŝuldanto.
Vojaĝaj komizoj kaj asekuraj agentoj.
RAKOUS, Vojtěch = ÖSTERREICHER, Albert (1862-1935):
La gevoj. RUTTE, Miroslav (1889-1954):
SCHEINPFLUG, Karel (1869-1948):
Kio estas pseŭdoartaĵo?
SOVA, Antonín (1864-1928):
Pejzaĝa skizo.
ŠVANDRLÍK, Miloslav (1932-):
Malfacilaĵoj de klerulo.
VLADYKA, Lev = DEYL, Václav (ml.) (1905-1982):
Prijuĝo.
VRCHLICKÝ, Jaroslav = FRÍDA, Emil (1853-1912):
Ludiloj.
Luna nokto.
ZEYER, Julius (1841-1901):
Gompaĉi kaj Komurasaki.

Eseoj, felietonoj

ARBES, Jakub (1840-1914):
Studo pri pulo.
ČAPEK, Karel (1890-1938):
El "Kritiko de vortoj".
El la opinioj de l' kato.
Instruo, kiel malsani.
Kamentuboj.
Kien foriĝas la libroj.
La arda koro de l' domo.
Legajo - afero laŭcirkonstanca.
Malgranda kaj granda.
Pri malnovaj leteroj.
Pri periostozo.
Pri specialaj vinoj.
DRDA, Jan (1915-1970):
Ni ricevis plantidon.
MAREK, Jiří = PUCHWEIN, Josef Jiří (1914-1994):
La gajigaj bestetoj de sinjoro Lada.
PUTÍK, Jaroslav (1923):
Pri homa feliĉo. .

Prifakta literaturo

Faktoj pri Ĉeĥoslovakio.
Hradec Králové ("Reĝina Kastelo").
Juĝu mem!
ORT, Jan (1917-1984):
Skizo de la historio de la moderna Ĉeĥa literaturo.
Tridek jaroj.
VANĚČEK, Václav (1905-1985):
Reĝo, kiu sopiris pacon.
ŽALUD, František = ŽALUD, Herbert (1919-1993):
Grandaj figuroj de la ĉeĥa tekniko.